

# AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Accademia  
Internazionale  
delle Scienze

International  
Academy  
of Sciences



San-Marino

Internationale  
Akademie der  
Wissenschaften

Académie  
Internationale  
des Sciences

## 27a SANMARINECA UNIVERSITATA STUDADSESIO SUS 27

Komárno (SK)  
2004-08-26 / 09-06  
(1703/04 pFR)

Siebenundzwanzigste Sanmarinesische Universitäre Studentagung  
Ventisettesima Sessione Universitaria Sammarinese  
Twenty-seventh Sanmarinian University Session  
Vingt-septième Séance Universitaire Sanmarinienne  
Dvadsiate siedme univerzitné študijné sústreďenie AIS San Marino  
Huszonhetedik san-marino-i egyetemi értekezlet

ligita al la inaŭguro de la Libera Eŭropia Universitato Kelemantia de AIS  
verbunden mit der Eröffnung der Freien Europäischen Universität Kelemantia der AIS  
(LEUKAIS)

## Programo de SUS 27

La studadsesio SUS 27 de AIS okazos en la urbo Komárno ĉe Danubo (SK), en la akademi-domaro ĉe str. Župná/Megye 1 (Eŭropa Placo, portalo Gronlanda). Ĉirkaŭ SUS 27 okazos Someraj Universitataj Semajnoj de 2004-08-25 al 2004-09-06 por inaŭguri la Liberan Eŭropan Universitaton Kelemantia (LEUKAIS). La aranĝoj de SUS 27 estos samtempe aranĝoj de la unua fakultato de LEUKAIS. La aliaj fakultatoj de LEUKAIS same kontribuos al la programo; ili estas:

- Dua fakultato: Eŭropiko (en salono Lapenna)
- Tria fakultato: Interkultura dialogo (en salono Zamenhof)

### 1 Oficialaĵoj

dato	horo	evento	salono
08-29 di	10:00–11:00	senatkunsido (nepublika)	Peano
	11:00–12:00	ekzamenofico (nepublika)	Peano
	12:00–13:00	ekzamenofico (konsult-horo)	Peano
	16:00–17:00	assembleo de la Subtena Sektoro	Hesse
	17:00–20:00	koncerto kaj inaŭguro de SUS 27, de LEUKAIS kaj de la salonoj de la fakultatoj, sektoroj kaj sekcioj en la Akademi-domaro	Danubia Muzeo, Akademi-domaro
	20:00–	Interkona vespero	Europália
08-31 ma	20:00–20:30	sekcikunsidoj 1–6	sekcisalonoj
09-01 me	20:00–21:30	forumo pri akad. rekomendoj	Zamenhof
09-04 sa	18:00–19:00	kunveno de Eŭropa Klubo	Lapenna
09-05 di	10:00–12:00	ĝenerala assembleo de SciS	Lapenna
	12:00–13:00	fermo de SUS 27	Komenský

### 2 Kursoj kaj prelegoj

#### 2.1 Sciencaj kursoj (universitateca programo de fakultato 1)

La sekvaj kursoj – validaj po unu stud-unuon (stu) – okazos ekde lundo ĝis ĵaŭdo (08-30/09-02), ĉiutage je la sama tempo, en blokoj nomataj A/B/C/D<sup>1</sup>. La paŭzoj tagmezaj kaj vesperaj nomiĝas M kaj V:

	A	B	M	C	D	V
kurso	8:30–10:00	10:30–12:00	12:00–14:00	14:30–16:00	16:30–18:00	18:00–20:00
ekz., ĵaŭde	16:00–16:30	16:30–17:00		17:00–17:30	17:30–18:00	

#### Sekcio 1: Kibernetiko

K1 OProf. Dr. habil. Eva Poláková (Komárno, SK), OProf. Dr. Reinhard Fössmeier (DE)

**Kreado de kursoj kaj didaktiko de elektronika instruado** (bloko C)

K2 OProf. Dr. habil. Helmar Frank (Paderborn, DE), ADoc. Mag. Sara Konnerth (Sibio/Hermannstadt, RO)

**Elementoj de programita instruado** (bloko B, en la studenta domo ČAJKA!)

K3 OProf. Dr. habil. Helmar Frank (Paderborn, DE)

**Elementoj de komunikad-kibernetiko** (blokoj D kaj V (lunde, marde))

<sup>1</sup>Por eviti miskomprenojn ni ne uzas la literon Ĉ por marki listerojn.

## Sekcio 2: Humanistiko

- H1 OProf. Pennacchietti (Torino, IT)  
**Transliterado en latinalfabeton de semidlingvaj, ĉefe arabaj, vortoj kaj nomoj.** (bloko A)
- H2 OProf. Korĵenevskaĵa-Gouriou (Aix-en-Provence, FR)  
**Alegorio en teatro de Okcidenta Eŭropo** (bloko C)
- H3 AProf. Ana Vrajitoru dr. conf. (Iași, RO), Mag. Cristina Tanc (RO), Alfred Toth dr. (US)  
**Lingvaj universalaj kaj lingvoj:** lingvistikaj fundamentoj kaj unuaj plenumaĵoj de la eŭrolingvistika programo de Sibiu-Hermannstadt (bloko B)

## Sekcio 4: Filozofio

- F1 OProf. Dr. Helmut Angstl (Munkeno, DE)  
**Enkonduko en la logikon** (bloko A)
- La kurso enkondukas en la formalan logikon de proponoj (eldiroj). Estos traktataj la bazaj nocioj kaj proceduroj kun klarigo per ekzemploj kaj aplikadoj.

## Sekcio 5: Natursciencoj

- N1 OProf. Hans Michael Maitzen dr. (Vieno, AT)  
**La eksplodo de astronomia scio dum la pasinta duonjarcento** (bloko B)
- Dum la tempodaŭro 1900–1950 okazis gravaj ŝanĝoj en la astronomia esplorado, ĉefe pro la disponeblo de novaj grandaj instrumentoj, kulminanta en la 5-metra teleskopo de monto Palomaro (Usono). Tamen dum la sekva duonjarcento la astronomia esplorado evoluis multe pli rapide kaj atingis novajn dimensiojn de scio pri la aĝo de nia Universo, pri la evoluo de nia Galaksio, pri la evoluo de la steloj, aparte de nia Suno kaj pri la konsisto de nia planeda sistemo, inkluzive de la efikoj de astraj kolizioj (kometoj, asteroidoj). Ĉio ĉi ŝuldiĝas kaj al la enorma vastiĝo de la kalkulkapablo de elektronikaj komputiloj kaj al la konstruado de gigantaj novaj teleskopoj kaj sur la Tera surfaco kaj en la ĉirkaŭtera spaco.
- N2 OProf. Quednau dr. (Haag/Amper, DE)  
**Enkonduko al la konkluda statistiko** (bloko A, jam 8:00–9:30)
- N3 AProf. Dr. habil. J. Lechowski (PL)  
**Apliko de teorio de informemocia kampo en atingado de didaktik-edukaj kaj ekonomikaj sukcesoj** (bloko C)

## Sekcio 6: Morfosciencoj

- M1 OProf. Dr. Lobin (Paderborn, DE), EProf. Mag. Lewanderska-Quednau dr. (Haag/Amper, DE)  
**Eŭropaj komunumoj kontraŭ lingvaj, religiaj kaj etnaj problemoj** (bloko B)
- Dum la Unua Mondmilito la Ruĝa Kruco uzis la Internacian Lingvon kiel helplingvon por interkomuniki. Sekvis poste provoj ene de Ligo de Nacioj, kiujn iniciatis precipe d-ro E. Privat. Denove oni revenis al la problemoj de lingvaj kaj etnaj rajtoj en la jaro 2001, iniciate de la komisiono de EU. Tamen ĉiam lingvaj, religiaj kaj etnaj rajtoj ne estas ĝuste traktataj kaj respektataj.
- M2 OProf. Dr. Lobin (Paderborn, DE), EProf. Bojidar Leonov (Karlovo, BG)  
**Eŭropa turismiko** (bloko C)

## 2.2 Liberaj prelegoj (konferencprogramo de SUS 27)

Liberaj prelegoj kaj projekt-akceptigaj prelegoj okazas en la sekciaj salonoj, plejparte dum bloko D.

- K-p1 OProf. Dr. Reinhard Fössmeier (Munkeno, DE)  
**La rolo de optimismo en maŝina tradukado** (marde kadre de K3, 18:30)
- Por ĉiuj sciencaj esploroj necesas iom da optimismo, sed en la historio de maŝina tradukado ĝi ŝajnas ludi aparte gravan rolon; precipe en la opinio de la publiko.

- K-p2 Alfred Toth dr. (Tucson, US)  
**Semiotiko kaj plurkunteksta logiko** (marde kadre de kurso K3, 19:00)  
Projekt-akceptiga prelego cele habilitiĝon.
- H-p1 Liana Tuĥvatullina (Moskvo, RU)  
**(temo anoncota)** (me 09-01, 16:15–17:00)  
Projekt-akceptiga prelego cele doktoriĝon.
- K-p3 Jekaterina Bebenina dr.  
**(temo anoncota)** (me 09-01, 17:00–17:45)  
Projekt-akceptiga prelego cele habilitiĝon.
- F-p1 OProf. Dr. Helmut Angstl (Munkeno, DE)  
**Teorio de ne determinisma reala mondo** (ma 08-31, 16:15)  
La reala (fizika) mondo konsistas el entoj, kiuj troviĝas en tempo kaj spaco. Ĝenerale tiu ĉi mondo estas komprenata determinisme, tiel, ke modala distingo (neceso – efektiveco – ebleco) kaj libera agado ne ekzistas. En la prelego estos prezentata konsistenca teorio de reala mondo, kie modaleco ekzistas kaj libereco eblas.
- F-p2 Dr. Eugen Macko (Munkeno, DE)  
**La socipsika saniga efiko de Esperanto.** (me 09-31, 16:15)  
Pri la esperantdialogika metodo terapii kaj evoluigi la internacian konscion.
- N-p1 ADoc. Tatjana Rudakova dr. (RU)  
**Nanokompozitoj, polimeroj kun novaj kvalitoj** (me 09-01, 18:30)

### 2.3 Teknika (Scienc-aplika) Sektoro

La Scienc-aplika Sektoro ankaŭ kontribuas al la startprogramo de la dua LEUKAIS-fakultato la kurson E1 de Prof<sup>T</sup> Gennadij Ŝilo (v. malsupre). Krome okazos cele evoluigon de estonta medicina fakultato prelegserio pri alternativa medicino kunordigata de EProf. Alicja Lewanderska-Quednau (Haag/Amper, DE), kun kontribuoj de Hans-Peter Bartos dipl. inĝ., Harald Schicke, Sebők Zsoltan mudr, F. Seep. Ĝi okazas lunde ĝis ĵaŭde dum blokoj C kaj D en salono Watt-Wüster-Zuse.

### 2.4 Arta Sektoro

En la Arta Sektoro okazos prelego (As1) de OProf. Prof<sup>A</sup> Kurd Alsleben (Hamburgo, DE) pri **La Arta Sektoro en la Akademio Kelemantia de AIS**. Tempo: lunde, 17h15–18h00, en salono Hesse. La ArS krome kontribuos al la inaŭguro per koncerto de ArS-ano Korobejnikov.

### 2.5 LEUKAIS, fakultato 2 (Eŭropiko)

Fakultato 2 de LEUKAIS (pri Eŭropiko) kune kun AIS Slovakio kontribuos al la kadra programo per ekskursoj antaŭ kaj post la kerna prelega semajno. La ekskursoj *antaŭ* la scienca programo okazos en la regiono ĉirkaŭ Komárno/Komárom, tiuj *post* la scienca programo kondukos al la proksimaj ĉefurboj Bratislavo, Budapeŝto kaj/aŭ Vieno.

La kursoj kaj liberaj prelegoj de la inaŭgura programo de fakultato 2 (okazontaj en ties salono Lapenna) estas:

E1 = TeS1: kurso de Prof<sup>T</sup> Gennadij Ŝilo (Moskvo, RU) pri **Eŭrop-Unia juro**. Tempo: sabate, 2004-08-28, blokoj D kaj V; dimanĉe, 2004-08-29, blokoj B kaj C,

E2: enkonduka kurseto de Katerina Varju (Komárno, SK) pri la **Hungara lingvo** ĉiutage de dimanĉo, 08-29, ĝis ĵaŭdo, 09-02, je 13:30–14:15, dimanĉe krome je 16:00–16:45, merkrede krome je 18:15–19:45.

E3 = H3: kurso de AProf. Vrajitoru (en salono Komenský, v. supre).

E p-1: OProf. Eva Poláková (Komárno, SK): **Identeco de AIS kaj ĝia perspektiva agado en EU** (slova). Lunde, 2004-08-30, 18:30–20:00

## 2.6 LEUKAIS, fakultato 3 (interkultura dialogo)

Fakultato 3 kontribuas al la kadra programo per ĉiutaga antaŭmatenmanĝa meditado (por budhanoj, kristanoj kaj islamanoj) en la dormdomo (ĈAJKA). Gvidos per germanlingvaj instrukcioj Peter Gäng dr. (DE). Laŭbezone asistos per tradukado en ILo Kassapa (Eberhard Kuhnhen, DE). Lundo ĝis dimanĉo, 7:00 – 7:45. Posedantoj de propra meditatkuseno aŭ meditadbenketo prefere kunportu ĝin, malmultaj ekzempleroj troviĝos surloke.

La kursoj kaj liberaj prelegoj de la inaŭgura programo de la fakultato, okazontaj en ties salono Zamenhof en tri sekcioj, estos:

### *Sekcio 3.1 (Interlingvistiko)*

D1: **Ilo 1** (por komencantoj) de ASci Liana Tuĥvatullina (Moskvo, RU), vendrede, blokoj D kaj V; sabate, 2004-08-28, blokoj A, B kaj C.

D2: **Ilo 2** (por progresintoj) de OProf. Korĵenevskaja-Gouriou dr. (Aix-en-Provence, FR), sabate, 2004-08-28, blokoj D kaj V, kaj dimanĉe 2004-08-29, blokoj A kaj C.

### *Sekcio 3.2: Abrahamaj (moseaj) religioj*

D p-1: OProf. Fabrizio Pennacchietti dr. (Torino, IT): **La tri moseaj religioj**: originoj, komunecoj, apartaĵoj, liturgilingvoj. Ĵaŭde, 10:30 – 12:00.

D3: **Adolf-Burkhardt-Seminario pri kristana ekumeno**. EProf. Boĵidar Leonov (Karlovo, BG) pri la ortodoksa eklezio, Bernhard Eichkorn pastro (Villingen, DE) pri la katolika eklezio, OProf. Fabrizio Pennacchietti (Torino, IT) pri la iraka eklezio, aliaj reprezentantoj de kristanaj religioj. Vendrede kaj sabate (09-03/04), 8:30 – 12:00.

### *Sekcio 3.3: Budhanaj religioj*

D4: Peter Gäng dr. (Berlin, DE): **Einführung in die Meditationsgeschichte des Buddhismus** (enkonduko en la meditan historion de budhismo, Germane). Lunde kaj marde, blokoj C kaj D.

D5 Adelheid Herrmann-Pfandt pd dr. (Marburg, DE) kaj Peter Gäng dr. (Berlin, DE): **Buddhismus**. Schwerpunkte: Mahayana und Vajrayana (budhismo; Germane). Marde (08-31), blokoj A kaj B, merkrede kaj ĵaŭde, blokoj A, B, C kaj D.

D6: Gunnar Gällmo IAS (Spånga, SE), Kassapa (Eberhard Kuhnhen, Berlin, DE) kaj Willfred Hartig praec. (Neckargemünd bei Heidelberg, DE): **Faktoj pri budhismo**: budhana ekumeno el la perspektivo de la teravado. Ĵaŭde kaj vendrede, blokoj C kaj D.

### *Intersekciaj programeroj*

D p-3 Willfred Hartig praec. (Neckargemünd bei Heidelberg, DE): **Interreligia komunikado** surbaze de komunaj kaj apartaĵoj / Kommunikation zwischen den Religionen aufgrund von Gemeinsamkeiten und Eigentümlichkeiten. Sabate (09-04), 14:30 – 15:15.

D-f **Sankta milito, tolerema apartismo aŭ komprenema dialogo inter la religioj?** Sabate (09-04), 15:30 – 18:30.

## 3 Kandidataj finekzamenoj

La finekzamenoj por kandidatoj, kiuj celas originale aŭ per adapta adopto akiri ĉe AIS la agnoskon de akademia nivelo (bakalaŭreco, magistrec, doktoreco aŭ habilit-doktoreco), okazas je vendredo (09-03) kaj sabato (09-04), laŭ surloke afiŝota horaro. La kandidatprelegoj

estas publikaj, kaj ĉiuj SUS-anoj estas bonvenaj ĉeesti la prelegojn de la kandidatoj kaj la postajn diskutojn. Parolaj fakekzamenoj (nepublikaj) kaj skribaj ekzamenoj (se necesaj) okazos laŭ horaro afiŝota de la Ekzamenofico.

La ekzamen- kaj studregularoj de AIS ŝanĝiĝis je 2004-06-14, sed ĉiu, kiu studentiĝis antaŭ tiu dato, rajtas ene de la valideco de sia legitimilo diplomiĝi laŭ la malnovaj regularoj. Ĉiu kandidato antaŭ sia finekzameniĝo nepre devas esti enskribiĝinta al minimume du (2) [malnovaj regularoj: tri (3)] sciencaj SUS-kursoj el fakultato 1 (se li ne jam havas la bezonatajn kurs-atestojn). Inter la du [tri] kursoj minimume unu devas esti en la sekcio, en kiu okazas la kandidatiĝo, minimume unu devas esti el alia sekcio. Laŭ la malnovaj regularoj maksimume unu el tiuj kursoj povas esti lingvokurso. Entute estas bezonataj kvar (4) atestitaj kursaj studunuoj; nur por adapta adopto sufiĉas, laŭ la novaj regularoj, la du SUS-kursoj.

Laŭ la novaj regularoj necesas sukcesa ekzameno pri ĉiuj kursoj; laŭ la malnovaj, en almenaŭ unu kurso (kaj en almenaŭ du, se ĉiuj studunuoj bezonataj por la fina ekzameno estas akiritaj dum la SUS) la kandidato devas sukcesi en la kursfina ekzameneto per minimume la noto 6/10 (7/10 sen ĉeesto en kurso).

La Ekzamenofico atentigas kandidatojn, ke prezentiĝo al la fina ekzameno sen antaŭa regularkonforma kompletigo kaj disponigo de ĉiuj necesaj dokumentoj al la Ekzamenofico povas kaŭzi aŭ *malakcepton de la kandidatiĝo* aŭ *postulon de krompago superanta la normalan ekzamenkotizon* pro la kroma laboro. Finan konstaton pri la plenumiteco de ĉiuj kondiĉoj nuntempe necesaj por akiri la agnoskon de sciencista grado de AIS oni jam ne ricevos pli ol du jarojn post la fina ekzameno. *Eksvalidiĝos do titol-agnoskoj, se eventualaj skribe fiksitaj kompletig-postuloj ne estos plenumitaj* de la kandidato dum tiuj du jaroj.

**Por eviti tiajn problemojn bv. rekontroli,  
ĉu ĉiuj viaj ekzamen-dokumentoj jam troviĝas ĉe la Ekzamenofico!**

La Ekzamenoficon por la jaroj 2004–2007 konsistigas

<b>Direktoro:</b>	OProf. Quednau
<b>Vicdirektoro:</b>	OProf. Polakova
sekcio 1 (kibernetiko):	OProf. Fössmeier
sekcio 2 (humanistiko):	OProf. Korĵenevskaja-Gouriou
sekcio 3 (struktursciencoj):	OProf. Minnaja
sekcio 4 (filozofio):	OProf. Angstl
sekcio 5 (natursciencoj):	OProf. Maitzen
sekcio 6 (morfosciencoj):	OProf. Lobin

## 4 Kadra Programo

Tradicie, AIS invitas ĉiujn SUS-anojn al la partopreno en la **Akademia Forumo** (2004-09-01) kun publika diskuto. La temo estos diskonigata surloke.

SUS 27 estos parto de la inaŭguro de *Akademio Kelemantia*, en kies unua fakultato ĝi enkorpiĝos. La inaŭguraj aranĝoj de la Someraj Universitataj Semaĵoj okazos de 2004-08-26 (ĵaŭdo) ĝis 2004-09-06 (lundo) kaj ampleksos diversajn prelegojn, ekskursojn kaj kulturajn eventojn. Ĉiuj SUS-anoj estas invitataj partopreni.

- Malfermo de **foto-ekspozicio** pri Romaaj virinoj, dimanĉon, 08-29, 14:00.
- Fortepiana **koncerto** de la Rusa muzikisto Korobejnikov, ano de la Arta Sektoro de AIS, kadre de la SUS-inaŭguro.
- **Interkona vespero** kun Hungara nacia muziko, dimanĉon, 08-29, 20:00, en la centro Europália sub la Eŭropa Placo.

- **Urbaj promenoj** kun informakompananto (ĉiĉerono).

Estas ofertataj jenaj ekskursoj (la prezroj dependas de la nombro de partoprenantoj):

**A1.** (vendrede, 08-27 kaj 09-03 ekde de la 15:00 h.) Duontaga folkloro programo – gitara muziko, ekspozicio de naciaj manfaritaj donacoj – en la tipa Hungareca vilaĝo Búč kun bona nacia manĝaĵo kaj gustumado de 12 tipoj de vino en naturaj keloj. € 30 por 36 personoj, € 50 por minimume 15 personoj, inkluzive de vojaĝo per buso kaj kaleŝo, manĝaĵo kaj trinkaĵo.

**A2.** (vendrede, 08-27 kaj 09-03 ekde de la 15:00 h.) Interkona postagmezo en urbeto Sankta Petro (Svätý Peter) kun cigana muziko kaj bona manĝaĵo kaj trinkaĵo (nacia brando, naturbakita porko, gustumado de bona vino, nacia kuko, kafo). € 20 por 36 personoj, € 35 por minimume 10 personoj, inkluzive de vojaĝo per buso, manĝaĵo kaj trinkaĵo.

**A3.** (ĵaŭde 08-26 kaj 09-02 kaj dimanĉe, 09-05 ekde de la 15:00 h.) Veturado pere de ŝipo preter Gabčíkovo – konata akva digo inter Slovakio kaj Hungario. € 15 por 36 personoj, € 20 por 10 personoj, inkluzive vojaĝon per buso kaj ŝipo.

**B1.** (dimanĉe, 08-29 kaj 09-05 ekde je la 8:00 h.) Tuttaga vizito de la bela historia urbo Nitra kun tagmanĝo, poste vojaĝo al la banloko Podhajska, kie ni baniĝos en varma kuraca akvo. € 17 por 36 personoj, € 25 por minimume 10 personoj, inkluzive de vojaĝo per buso, bileto al banejo kaj tagmanĝo.

**B2.** (dimanĉe, 08-29 kaj 09-05 ekde je la 8:00 h.) Tuttaga vizito en du urboj: banloko Šturovo kaj historia Hungara urbo Esztergom, kun tagmanĝo. € 22 por 36 personoj, € 35 por minimume 10 personoj, inkluzive de vojaĝo pere de buso, bileto al banejo kaj tagmanĝo kaj vespermanĝo en vilaĝo Mocsá.

Interesuloj devas aliĝi plej malfrue je 2004-08-23, aŭ dum la registriĝo ĉe alveno, tiuokaze kun aldona pago de € 5.

En Komarno eblas ankaŭ bani sin en varma kuraciga akvo, preni masaĝojn, kuracigajn resanigajn programojn de alternativa medicino, ktp.

## 5 Organizaj detaloj

### 5.1 Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj

Ĉiu SUS-ano rajtas senpage enskribiĝi kaj partopreni kursojn (tion inkluzivas la aliĝkotizo). Kontraŭ aparta kotizo (po 0,3 AKU por unu kurso) oni ricevas oficialan partopren-ateston, ĉeestinte minimume 3/4jn, kaj noton, se oni sukcesis en la kursfina ekzameneto. La ekzameno povas okazi en skriba formo, ekzemple per elekt-respondoj aŭ liberaj respondoj konsistantaj nur el nomoj, nombroj aŭ unuopaj vortoj, tiel ke sufiĉas kompreno de ILo kaj ne necesas propra esprim-kapablo. La ekzameneton oni rajtas partopreni sen ĉeesti la kurson dum la sama SUS, do iamaj kursanoj povas ripeti la ekzameneton.

Ankaŭ pri kursoj ofertataj en la *instruteko* povas okazi ekzamenetoj por studantoj, kiuj aŭ luprenis aŭ aĉetis kursmaterialon aŭ pagas kurskotizon.

Se studanto ekzameniĝas sen 3/4-a partopreno en kurso, li devas sukcesi minimume per la noto 7/10 por ricevi ateston.

La kursfinaj ekzamenetoj okazos ĵaŭde (09-02) vespere, se nenio alia estas anoncita dum la kursoj. La SUS-anoj, kiuj intencas akiri kurs-atestojn, enskribiĝu al la kursoj ĉe la SUS-oficejo dum la akcepto-/registriĝ-tagoj (08-28/29).

Bonvolu atenti, ke je 2004-06-14 ŝanĝiĝis la regularoj de AIS. Kiu studentiĝis post tiu dato, povas akiri studunuojn nur per kursfina ekzameneto; puraj partopren-atestoj ne plu validas.

## 5.2 Prelegoj

La preleg-kunsidojn gvidas la dekanoj aŭ vicdekanoj de la koncerna sekcio, aŭ taskitoj de ili. La partopreno en prelegoj (kontraŭe al partopreno en kunordigita preleg-serio) ne egalvaloras al kurspartopreno.

*Debutprelegojn* prezentas nove alvokitaj profesoroj, *docentiĝprelegojn* estontaj plenrajtaj docentoj de AIS. La prelegoj daŭras po 45–60 minutojn, inkluzive de diskuto kaj paŭzeto. La preleglingvo estas ILo.

La sama tempo estas je dispono por *invititaj prelegoj* (en iu ajn oficiala lingvo de AIS) kaj por *projekt-akceptigaj prelegoj* (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan originalan akiron (ne adopton) de grado de AIS.

Ankaŭ liberaj ISKanoj (t. e. ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj apartenas al AIS) rajtas prezenti t. n. *liberajn prelegojn*, pere de la dekanano de la koncerna sekcio. Ili rajtas okazi en iu ajn oficiala lingvo de AIS kaj daŭri po 25–40 minutojn.

Ankaŭ *konciz-prelegoj* (10–20 minutoj) povas okazi en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili estas oferteblaj ankoraŭ post la starigo de la SUS-programo, tra la koncerna (vic)dekanano aŭ (vic)fakarestro. Temoj de konciz-prelegoj ne listigitaj en la programkajero estos afiŝataj dum SUS laŭ la informoj transdonitaj de la prelegontoj al la SUS-oficejo.

## 5.3 Aliĝo

Aliĝilojn bonvolu sendi al la senata sekretario (Dr. Reinhard Fössmeier, Rahel-Straus-Weg 19, DE-81673 München, Germanio). Presebla aliĝilo (aranĝo PDF) troveblas Interrete ĉe la SUS-informoj,

[www.ais-sanmarino.org/arangxoj/sus/sus27](http://www.ais-sanmarino.org/arangxoj/sus/sus27).

Bonvolu atenti, ke aliĝoj ne estas trakteblaj sen pago de la aliĝkotizo. La kotizo ne inkluzivas ekzamenkostojn, kurskotizojn (por ricevo de atesto), kostojn por loĝado kaj manĝado. Aliĝo ne estas transdonebla.

Pagi aliĝkotizon devas ankaŭ *kursgvidontoj* kaj *prelegontoj*. Kurs- kaj prelegproponoj kaj aliĝoj por ekzameno estas trakteblaj nur post alveno de la SUS-aliĝkotizo.

Ĝis unu monato antaŭ la komenco de la sesio (t. e. ĝis 2004-07-31) la aliĝkotizo estas nur 0,3 AKU, poste 0,5 AKU. Kotizo por unutaga partopreno en SUS estas po 0,2 AKU. La kotizo estas pagebla laŭ jenaj vojoj (ĉiam kun indiko de la pagocelo kaj de la nomo de la aliĝanto):

- al la Germana konto 2051-305 de AIS ĉe Postbank Hannover, banko-kodo 25010030, Swift-kodo PBNKDEFF250; IBAN DE19 2501 0030 0002 0513 05, BIC: PBNKDEFF.
- al la UEA-konto de AIS: aisc-j.
- ĉeke (nur en EUR, kun aldono de 0,15 AKU) al la trezoristo (OProf. B.-A. Wickström, Humboldt-Universität, Spandauer Str. 1, DE-10178 Berlin).

ISKanoj, kies servobonhavo havas pluson de almenaŭ 0,5 AKU, povas simple deprenigi la kotizon de ĝi. Dumvivaj subtenaj membroj kaj studentoj kun valida legitimilo ne pagas SUS-kotizon, se ili aliĝas minimume kvar semajnojn antaŭ la sesio; poste ili pagas 0,2 AKU.

## 5.4 Mono

Kadre de AIS kostoj kaj prezoj estas indikataj en „Akademiaj Kotiz-Unuoj“ (AKU). 1 AKU nun valoras € 65,00. Dum SUS 27 AIS akceptas pagojn en eŭroj aŭ en la loka valuto, la Slovaka krono (SKK).

La valuto sude de Danubo en Komárom estas la Hungara forinto (HUF). Bonvolu atenti, ke la moneroj de 10 SKK kaj 20 HUF havas la samajn koloron kaj diametron, sed la unua



valoras proksimume la trioblon de la dua. Kontrolu ricevatan ŝanĝmonon!

## 5.5 Salonoj

La salonoj estas nomitaj honore al jenaj eminentuloj:

**ARISTOTELO de Stagira**, Greke *Αριστοτέλης* (384–322 a. K.)

Helena filozofo, fondinto de la empiria naturscienco en la kadro de ampleksa empiria sistemo kondukanta de la logiko ĝis la ŝtateorio. Liaj instruoj ĝis la fino de la mezepoko restis la fundamento de sciencaj instruado kaj esplorado. Li estis disĉiplo de Platono kaj instruisto de Aleksandro la Granda.

**George BOULANGER** (1909–1982)

Fondinto (en 1957) de *Association Internationale de Cybernétique* (Namur, BE) kaj ties prezidanto ĝis sia morto; en 1980 enkondukis en tiun asocion ILOn kiel trian laborlingvon, eklerninte ĝin kiel 70-jarulo. Vicprezidanto de Eŭropa Klubo kaj membro de ties iniciat-grupo AIS.

**René DESCARTES**, Latine: Renatus Cartesius, ILe: Kartezio (1596–1650)

„La patro de la moderna filozofio“, kiel oni ofte nomas lin, provis ligi filozofion al la natursciencoj aplikante al ambaŭ racian metodon. Sian mekanikan mondkoncepton li aplikis eĉ en la psikologio. Li skizis ankaŭ principojn de planlingvo en sia letero de la 20a de novembro 1629 al la benediktana scienculo *Mersenne*.

**EŬKLIDO de Aleksandrio** (*Ευκλείδης*) (ĉ. 365–ĉ. 300 a. K.)

Greka matematikisto kaj naturesploristo, kiu laboris sub Ptolemeo (Ptolemaios) 1-a ĉe la ”Museion” en Aleksandrio. Lia plej fama verko estas la libro “Elementoj”, aksioma prezento de la tutaj tiamaj geometrio kaj aritmetiko. Krome li verkis manlibron “Geometria optiko” kaj aliajn traktaĵojn pri planimetrio, sfero kaj matematika muzikteorio.

**Galileo GALILEI** (1564–1642)

Kvankam liaj ideoj troviĝas kadre de la kristana mondkoncepto, la Itallingva natursciencisto konfliktis kun la katolika eklezio pro sia verko pri la galaksi-modeloj, en kiu li argumentas por la nova, kies centro estas la suno. Kiel unu el la unuaj sciencistoj li verkis ne plu en la Latina lingvo, nekomprenata de vasta publiko.

**Hermann HESSE** (1877–1962)

La verkisto, distingita per la Nobel-premio pri literaturo en 1946, interalie verkis la futurisman romanon *Das Glasperlenspiel* (la vitrobida ludo), en kiu li alegorie priskribas la akademian mondon kaj ĝiajn rilatojn al la cetera aŭ ekstera mondo. Ĝi plurrilate respeguliĝas en la ideo de AIS.

**Mohandas Karamchand GANDHI** (1869–1948)

Hinda politikisto, kiu proklamis senarman ribelon kontraŭ la okupadaj trupoj, per manŝpindado kontraŭ la teksaj fabrikoj de Britio, per “salmarŝo” kontraŭ la brita salmonopolo, per reiro al simpla natura vivoformo, por formi sendependan komunan ŝtaton de hinduoj kaj islamanoj. Li subtenis la ideon de la Internacia Lingvo, kunlaborante kun la svisa sciencisto *Edmond Privat*.

**Jan Amos KOMENSKÝ**, Latine: Johannes Amos Comenius (1592–1670)

La fondinto de la moderna pedagogio ne nur teorie, sen ankaŭ praktike kontribuis al sia fako, i.a. per facila lingvoinstrua legolibro. Li proponis la enkondukon de planlingvo kaj la

starigon de internacia akademio de la sciencoj.

**Ivo LAPENNA** (1909–1987)

La internacie konata juristo tre aktivis en la Esperanto-movado kaj dum multaj jaroj estis estrarano, poste prezidanto de UEA. En 1954 li atingis, ke la Ĝenerala Konferenco de UNEKSO rezoluciis favore al Esperanto. Kadre de Eŭropa Klubo li verkis memorandon pri Eŭropa lingvopolitiko, subtenis la sciencistan uzadon de la Internacia Lingvo kaj aktive partoprenis en la fondo de AIS San-Marino.

**Giuseppe PEANO** (1852–1932)

La Itala matematikisto interalie starigis sistemon por aksioma difino de la naturaj nombroj. En 1903 li prezentis planlingvan projekton de simpligita Latino, nomatan „*Latino sine flexione*“; en tiu lingvo li eldonis sian verkon *Formulario Mathematico*. Ek de 1909 li estis prezidanto de la planlingva akademio *Academia pro Interlingua*.

**Hermann SCHMIDT** (1894–1968)

Jam en la jaro 1941 la Germana fizikisto kaj regulad-teknikisto prezentis la bazajn principojn de kibernetiko. Ek de ĉ. 1962 li pli kaj pli influis la filozofion de la klerig-kibernetiko kaj de aliaj antropokibernetikaj branĉoj.

**James WATT** (1736–1819)

Skota maŝinkonstruisto, kiu inventis multajn plibonigojn por vapormaŝinoj, inter ili centrifugan rapidec-regulilon, kiu interligis la energitransforman kaj la informprilaboran teknikojn. Honore al li la fizika unuo de la povo nomiĝas ŭato aŭ vato.

**Eugen Bernhard WÜSTER** (1898–1977)

La Aŭstro Wüster, unu el la fondintoj de esperantologio kaj brila interlingvisto, estis ankaŭ la fondinto de la terminologia scienco kaj impulsdonanto por aliaj sciencobranĉoj. Li longe traktis la Internacian Lingvon de d-ro Esperanto kiel normigan lingvon de la estonteco, sed konsideris por tio ankaŭ aliajn planlingvojn.

**Lejzer ZAMENHOF** (Ruse: Лейзер Заменгоф) (1859–1917)

La juda kuracisto ne nur konstruis la bazon de la planlingvo, kiu poste estis nomita Esperanto, sed ankaŭ projektis neŭtralan religion, la homaranismon. Per tiuj du projektoj li esperis forigi la precipajn kaŭzojn por interhomaj disputoj kaj militoj.

**Konrad Ernst Otto ZUSE** (1910–1985)

Germana inĝeniero, pioniro en la konstruado de (unue mekanikaj, poste elektronikaj) kalkulmaŝinoj. Li inventis ankaŭ la unuan programad-lingvon, nomitan *Plankalkül* (plana kalkul-sistemo).

## 6 Instruteko

Dum SUS 27 je la unua fojo eblos akiri studunojn ankaŭ surbaze de memstara studado de kursoj el la instruteko de AIS, se la kandidato sukcesas en kursfina ekzameno per noto de minimume 7/10. La ekzameno povas okazi dum SUS 27, se la kandidato sciigas sian deziron kun indiko de la elektita(j) kurso(j) plej malfrue **14 tagojn** antaŭ la malfermo de SUS 27 al la ekzamen- kaj klerigofico (OProf. H. D. Quednau, Forstwissenschaftliche Fakultät, Am Hochanger 13, DE-85354 Freising).

Superrigardo pri la Interretaj kursoj de AIS troviĝas ĉe [www.ais-sanmarino.org/kursoj/](http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/). Sed ne ĉiuj tiuj kursoj estas disponeblaj por ekzameno dum SUS 27. Ĉe intereso bonvolu

informiĝi ĉe la klerigofico.

## 7 Situo de Komárno kaj la Eŭropa Placo

Komárno situas ĉe la enfluejo de la rivero Vago (*Váh, Vág*) en la riveron Danubo, kiu tie markas la landlimon inter Slovakio kaj Hungario. La urbo estas dulingva (sk+hu) kaj havas iom pli ol 30.000 loĝantojn. Aliborde (sude) situas la Hungara urbo Komárom. La alteco estas ĉirkaŭ 110 m super marnivelo.

La du urboj informas pri si Interrete, [www.komarno.sk](http://www.komarno.sk) en kvar lingvoj, [www.komarom.hu](http://www.komarom.hu) nur en la Hungara. La du bordojn ligas pontoj voja kaj fervoja. La long-distancaj trafik-ligoj orient-okcidentaj estas pli bonaj sude de Danubo. La poŝtkodo de Komárno estas SK-94501, tiu de Komárom HU-2900.

Kelkaj urbomapoj montras Slovakajn, aliaj Hungarajn stratnomojn; strat-ŝildoj montras ambaŭ. En ĉi-suba tabelo vi trovas kelkajn gravajn stratojn kaj placojn kun tradukoj.

**SUS-ejoj.** La plejparto de la SUS-programo okazas en la Akademidomaro ĉe la Eŭropa Placo, strato Župná/Megye (Distrikta) 1. Kelkaj partoj okazas en la studenta loĝejo ČAJKA, Bratislava strato 1. La inaŭguro okazas en la Danubia Muzeo en strato Palatinová/Nádor (Guberniestra); ĝi estas markita per "M" en la ĉi-suba mapo.

**Loĝado.** En Komárno kaj en Komárom troviĝas pluraj hoteloj de diversaj kategorioj. Iuj ofertas informojn kaj mendon en la Interreto. Jen kelkaj ekzemploj (sen rekomendo aŭ garantio pri ĝusteco; prezoj de printempo 2004):

- Hotelo **Europa**<sup>\*\*\*</sup>, pl. Štefanika 1. Tel. +421-35-7731349.
- Hotelo **Panorama**<sup>\*\*</sup>, Športova. Fx: +421-35-770-1969.
- Pensiono **Banderium**<sup>\*\*</sup>, pl. Štefanika 11. Tel. +421-35-7730156. [www.banderium.sk](http://www.banderium.sk). Dulita ĉambro 1900 SKK.
- Pensiono **Delta**<sup>\*\*</sup>, Malodunajské Nábrevie 10 (insule). Fx. +421-819-63861. Lito en dulita ĉambro 960 SKK.
- Pensiono **King**, Letná 4. Tel. 00421-35-7113158.

La hoteloj en Komárom plejparte troviĝas proksime al la banejo. La distanco al la centro de Komárno estas ĉ. 3 km.

- Hotelo **Juno**<sup>\*\*\*</sup>, Bem J. u., HU-2900 Komárom. Fx +36-34-340568.
- Hotelo **Karat**<sup>\*\*\*</sup>, Czuczor Gergely u. 54, HU-2900 Komárom. Fx +36-34-344500.



Krome disponeblas favorprezaj ĉambroj en la studenta loĝejo ČAJKA (ĉ. 3 km de la urbo-centro), kie eble okazos parto de la programo. La loĝejo situas ĉe Bratislava strato (kp. la mapeton). Ĝis 2004-08-10 ĉiuj povas anonci intereson loĝi tie (kun propraj necesejo kaj duŝo): 1 persono sola en ĉambro € 8, 2 personoj kune po € 5, 3 personoj po € 4.

**Alvojaĝo.** Venante sur la Hungara aŭtovojo M1 (E60/E75) uzu la elirejon „Komárom/Kisber“, iru norden (Hungara nacia vojo 13) al Komárom kaj transiru Danubon. Venante de nordo uzu la Slovakian nacian vojon 64 de Nitra kaj Nové Zámky.

Fervoje estas pluraj ebloj atingi Komárnon. Ni konsilas informiĝi en stacidomo aŭ Interrete. Ĉar malmultas trajnoj inter Komárno kaj Komárom, konsideru eltrajniĝi en Komárom, de kie Komárno estas facile atingebla; taksio al la centro de Komárno kostas ĉ. 200 SKK (sen garantio). Se vi bezonas lingvan helpon kaj parolas ILe aŭ Germane, vi povas voki 00421-908-757840 (Poláková) aŭ 00421-905-624438 (Sebők).

La flughavenoj de Bratislavo, Budapeŝto kaj Vieno distancas de Komárno je 100–150 km.

**Telefonado.** La internacia antaŭnumero de Slovakio estas **421**, tiu de Hungario **36**. Por



konekto eksterlanden en ambaŭ landoj ciferumu **00**.

---

## Enhavo


<b>1</b>	<b>Oficialaĵoj</b>	2
<b>2</b>	<b>Kursoj kaj prelegoj</b>	2
2.1	Sciencaj kursoj (universitateca programo de fakultato 1)	2
2.2	Liberaj prelegoj (konferencprogramo de SUS 27)	3
2.3	Teknika (Scienc-aplika) Sektoro	4
2.4	Arta Sektoro	4
2.5	LEUKAIS, fakultato 2 (Eŭropiko)	4
2.6	LEUKAIS, fakultato 3 (interkultura dialogo)	5
<b>3</b>	<b>Kandidataj finekzamenoj</b>	5
<b>4</b>	<b>Kadra Programo</b>	6
<b>5</b>	<b>Organizaj detaloj</b>	7
5.1	Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj	7
5.2	Prelegoj	8
5.3	Aliĝo	8
5.4	Mono	8
5.5	Salonoj	9
<b>6</b>	<b>Instruteko</b>	10
<b>7</b>	<b>Situo de Komárno kaj la Eŭropa Placo</b>	11
	<b>Programtabelo</b>	15

---

Kalendareto								
	lu	ma	me	ĵa	ve	sa	di	
aŭg	23	24	25	26	27	28	<b>29</b>	aŭg
	<b>30</b>	<b>31</b>	<b>1</b>	<b>2</b>	<b>3</b>	<b>4</b>	5	
sep	6	7	8	9	10	11	12	sep

Kelkaj stratoj kaj placoj en Komárno		
mape	hu	sk
Danuba Kajo	Duna rakpart	Dunajske nábrežie
Distrikta	Megye	Župná
Elektreja	Villanytelep u.	Elektrárenská cesta
Elizabeta ponto	Erzsébet híd	Alžbetin most
EU (Eŭropa Placo)	Európa-udvar	Nádvorie Európy
Guberniestra	Nádor u.	Palatinova
Ĝardenista	Kertész út	Záhradnická
Interna Ringo	Belső körút	Vnútrná okružná
Kastela	Vár u.	Hradná
Kiraly	Kiraly püspök u.	ul. bisk. Kiralya
Klapka	Klapka tér	nam. gen. Klapku
Komenia	Komenius u.	Komenskeho
Koŝut	Kossuth tér	nam. Kossutha
Limgardista	Határőr u.	Pohradničná
Medjer	Megyeri út	Mederčska
Petöfi	Petőfi út	Petőfiho
Rakoci	Rákóczi út	Rákócziho
Ŝtefanik-placo	Štefánik tér	nam. Štefanika
Tabaka	Dohány körút	Tabaková

Skiza stratplano de Komárno (SK). Informoj sen garantio. AIS San-Marino.




	sal.	A 8:30–10:00	B 10:30–12:00	C 14:30–16:00	D 16:30–18:00	V 18:30–20:00	N vespere
sab 08-28	Za La	ILO 1 (ASci. Tuĥvatullina; komenco vendrede)		ILO 2 Eŭropia juro			
dim 08-29	Za La He Pe	ILO 2 (OProf. Korĵenevskaja) Eŭropia juro (Prof. Ŝilo)			SubS		Inter- kona vespero (20:00, Europália)
		ekzamenofico 11:00 nepublika 12:00 konsultado		17:00 inaŭguro (muzeo)			
lun 08-30	Sm Ko Dc Ga Ar La Za	H1 Pennac. F1 Angstl N2 Quednau	K2 Frank/Ko.* H3 Vrajitoru  N1 Maitzen M1 Lobin/Lew.	K1 Poláková H2 Korĵen.  N3 Lechowski M2 Lob./Leon.  D4 Gäng	K3 Frank As1 Alsleben  D4 Gäng	K3 Frank  Ep-1 Polák.	
mar 08-31	Sm Ko Dc Ga Ar Za	H1 Pennac. F1 Angstl N2 Quednau D5 Herm.	K2 Frank/Ko.* H3 Vrajitoru  N1 Maitzen M1 Lobin/Lew. D5 Herm.	K1 Poláková H2 Korĵen.  N3 Lechowski M2 Lob./Leon. D4 Gäng	K3 Frank  Fp-1 Angstl  D4 Gäng	K3 Frank	seki- kunsidoj 20:00
mer 09-01	Sm Ko Dc Ga Ar Za	H1 Pennac. F1 Angstl N2 Quednau D5 Herm.	K2 Frank/Ko.* H3 Vrajitoru  N1 Maitzen M1 Lobin/Lew. D5 Herm.	K1 Poláková H2 Korĵen.  N3 Lechowski M2 Lob./Leon. D5 Herm.	Kp-3 Beben. Hp-1 Tuĥv. Fp-2 Macko  D5 Herm.	Np-1 Rudak.	forumo pri akademiaj rekomendoj (20:00, Zamenhof)
ĵaŭ 09-02	Sm Ko Dc Ga Ar Za	H1 Pennac. F1 Angstl N2 Quednau	K2 Frank/Ko.* H3 Vrajitoru  N1 Maitzen M1 Lobin/Lew. Dp-1 Pennac.	K1 Poláková H2 Korĵen.  N3 Lechowski M2 Lob./Leon. D6 Gällmo	kursfinaj ekzamenetoj  D6 Gällmo		
ven 09-03	Ko Za	Publikaj finekzamenoj		Publikaj finekzamenoj			
		D3 Burkh.	D3 Burkh.	D6 Gällmo	D6 Gällmo		
sab 09-04	Ko Za	Publikaj finekzamenoj		Publikaj finekzamenoj		18h Lapenna	
		D3 Burkh.	D3 Burkh.	14:30 Dp-3, 15:30 D-f		Eŭr. Klubo	
dim 09-05	La		ĝ. asembleo 10:00–12:00	solena fermo 12:00			

\* K2 okazas en ČAJKA

Mallongigoj de la salonoj		
Bo	Boulangier	inaŭguro (muzeo)
Sm	Schmidt	Sekcio 1 (kibernetiko)
Ko	Komenský	Sekcio 2 (homsciencoj)
Pe	Peano-Eŭklido	Sekcio 3 (struktursciencoj)
Dc	Descartes	Sekcio 4 (filozofio)
Gl	Galileo	Sekcio 5 (naturesciencoj)
Ar	Aristotelo-Gandhi	Sekcio 6 (morfosciencoj)
La	Lapenna	LEUKAIS F2 (eŭropiko)
Za	Zamenhof	LEUKAIS F3 (interk. dialogo)
He	Hesse	Arta Sektoro
Wa	Watt-Wüster-Zuse	Scienc-aplika Sektoro

Komparu la  
klarigojn en  
ĉapitro 5.5

Scienc-aplika Sektoro		
Wa	lun-ĵaŭ (C kaj) D	Prelegserio Lewanderska
Arta Sektoro		
He	lun 17:15	Prel. Alsleben



Skema plano de la domoj kaj salonoj en la AIS-Akademidomaro Komárno  
str. Župná/Medgye 1 kaj Eŭropa Placo